

KVAZAŬ KOLOMBO BLANKA

G.Baker
Esperantigo: Emanuele Rovere

Mi vekigas frumatene je l'aŭroro en ĉiel', bonvenigas ĝojoplene tagon sub la bona stel'.
Kelkaj birdoj jam ekpepas, dum de floroj la parfum' min karesas kaj anoncas
la revenon de la sun'.

Kvazaŭ kolombo blanka, flugas mi super kampar'.

Kvazaŭ kolombo blanka, preter la montoj kaj mar', kun mia esper', kun mia liber'.

Mi imagas, ke mi flugas en vojaĝ' de poezi',
vidas mi la tutan mondon per mirakla fantazi'.

Kvazaŭ kolombo blanka, flugas mi super kampar'.

Kvazaŭ kolombo blanka, preter la montoj kaj mar', kun mia esper', kun mia liber'

Enkaĝigi oni provis, vane, la spiriton mian,
sed ĝi ĉiam ĉenojn rompis, savis la liberon sian.

Kvazaŭ kolombo blanka, flugas mi super kampar'.

Kvazaŭ kolombo blanka, preter la montoj kaj mar', kun mia esper', kun mia liber'.